Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio

# La Kolombo de Paco

**9-a de oktobro 2021, numero 23**

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova





## Fernando Maia Jr.,
Vicprezidanto de UEA

Tre karaj, saluton! Eĉ se virtualeco neniel anstataŭos la varmon de reala ĉeesto inter amikoj, denove okazis, ke la Virtuala Kongreso de Esperanto estis nia tutmonda renkontiĝejo. Mi dankas al vi ĉiuj, kongresanoj, kiuj donis sencon al nia laboro, kaj esperas, ke per nia 2-a VK vi sukcesis revidi samideanojn, komenci novajn amikecojn, lerni ion novan kaj inspiriĝi por agi kaj revi.

Mi ŝatus aparte danki al niaj amikoj en la redakcio de *La Kolombo de Paco*, kiuj ne nur akurate, sed abunde informis dum tiuj multaj tagoj. Tion ili faris en tempo, kiam ni primeditadis la signifojn de la Internacia Jaro de Paco kaj Konfido. Per sia stilo gracia kaj leĝera ili estis la alportantoj ne nur de gajo kaj ĝojo, sed ankaŭ de fidemo kaj ligiteco inter ni, homoj en tiu ĉi kompatinda mondo.

Mi sincere deziras, ke ni iru plu, antaŭen, kun espero serena kaj amo obstina kiel signoj al ni potencaj. Ke ni restu plene sanaj kaj restu sincere feliĉaj. Al vi ĉiuj koran dankon!

## Anna Striganova, Dima Ŝevĉenko

Karaj samideanoj, septembre fermiĝis kongresejo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto. Nun aperas la 23-a numero de *La Kolombo de Paco*. Ĝi estas la lasta en la ĉi-jara kongresa sezono. Same kiel pasintjare ni decidis kolekti opiniojn kaj impresojn de la legantoj kaj partoprenantoj. Vi povas legi ilin ĉi-numere kaj vidi, ke la lasta numero de *La Kolombo de Paco* estas pli "dika", ol kutime pro tio.

Nome de la redakcio ni volas danki ĉiujn kontribuantojn kaj sugestantojn, sen helpo de kiuj tiu ĉi kuriero ne povus sukcesi. Ni dankas al la legantoj, kiuj ne nur aktive elŝutis ĉiujn numerojn, sed ankaŭ disvastigis ilin tra la mondo, al siaj samideanoj, kiuj ne povis partopreni la 2-an VK.

Ni dankas al la Estraro de UEA, volontuloj de la CO kaj la Ĝenerala Direktoro, kun kiuj ni dense kunlaboris la tutan periodon. Apartan dankon al nia kara korektisto Rob Moerbeek, kiu fervore helpis lingve poluri tekstojn de la kuriero.

Ni ne adiaŭas vin, ni kunlaboru plu pri la diversaj informiloj de UEA.

Ni kune flugu antaŭen!

# Partoprenantoj pri la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto

## Wera Blanke (Germanio)

VK por mi pruvis, ke eblas virtuale anstataŭi ĉeestan kongreson.


Plej verŝajne estontaj mondkongresoj okazos hibride, por eviti tro multe da longaj flugoj.

Espereble oni samtempe organizos lokajn/landajn/kontinentajn subkongresojn, kiuj permesas komunan spektadon de la virtualaĵoj (*„public viewing“*) kaj eble eĉ proprajn kontribuojn al la komuna hibrida evento.



## Raita Pyhälä (Finnlando)

La Virtuala Kongreso estas granda teknika atingaĵo, kiu ĝojigis min, montrante ke Esperanto venkas obstaklojn, ĉar la generacioj pli junaj ol mi inventas kiel kaj ne ŝparas sian energion, sed kunlaboras kaj sukcesas. Ŝajnas al mi, ke la VK-j ĉiam okazos paralele kun la tradiciaj Universalaj Kongresoj. Ambaŭ havas siajn avantaĝojn. Kuraĝon!



## Svetlana Pogorelaja (Ukrainio)

Por mi Esperanto estas la plej grava parto de mia vivo. Tute ne gravas ke mi neniam laboris en Esperanto-movado kontraŭ mono, ĉar tie mi havas ĉiujn eblecojn spertiĝi en io ajn, en kio mi volus, akiradi novajn sciojn kaj kapablojn, vere havi amikojn en la tuta mondo, interhelpante unu al la alia progresi.

Dankon pro la virtualaj kongresoj de UEA!

Estante esperantistino de 1973 mi bedaŭrinde neniam havis eblecon partopreni UK-on. Lastatempe des pli: mi la tutan vivon laboris nur en ŝtataj lernejoj, sed la nuna ukrainia estraro en lastaj jaroj donas al mi, kaj al milionoj de aliaj ukrainiaj pensiuloj, kiel pension, nur malpli ol 2 eŭrojn por tago. Vi povas imagi kiom ĝoja mi estis ke povis tamen partopreni UK-ojn! Ne gravas ke virtuale – dum la kongresoj mi ĉiam sentis min en la rondo kun karaj gesamideanoj de la tuta mondo!

En la Kongresoj vere eblas konscii ke Esperanto estas la lingvo de paco kaj amikeco. Kiom ĝoja mi estis, kiam en la listo de la kongresanoj mi legis la nomojn de miaj malnovaj korespondamikoj! Kiom ĝoja mi estis ke ankaŭ miaj lernantoj partoprenis ĉi tiun gravan aranĝon. Mi "estis kune" ankaŭ kun kelkaj iamaj samurbanoj, kiuj pli frue disveturis al diversaj landoj.

Sed kio pli gravas: eblis aŭdi la plej spertajn, la plej estimindajn esperantistojn de la mondo. Kun ili mi poste ofte "renkontiĝadis" virtuale en aliaj gravaj internaciaj aranĝoj.


Virtualaj aranĝoj, kaj unuavice la Universalaj Kongresoj de UEA, donas tre gravan eblecon por ĉiuj plispertiĝi, ekadmiri la sukcesojn de la laboremuloj, ekdeziri provi kopii iujn agojn por ekhavi similajn rezultojn.

Mia opinio estas ke ankaŭ la 2-a Virtuala Kongreso de UEA en 2021 estis brila lernejo kaj por komencantoj kaj por spertuloj: ĉiam eblas kreski en siaj kapabloj pli kaj pli. Bonege estas ke eblis poste reaŭskulti ion, ja tiel la materialo fariĝas pli komprenata kaj pli ŝatata. Mi sincere deziras ke plejmulte da homoj ĝuu tiun ĉarman senton de internaciismo. Mi konstante instruas helpante al novaj homoj fariĝi esperantistoj. Kaj la grandaj sukcesoj en tio faras min eĉ pli feliĉa.



## Martin Meyer (Svislando)

Unue mi ŝatus ege danki ĉiujn organizintojn, kiuj ebligis tian Virtualan Kongreson. Bedaŭrinde mi mem spite de mia registriĝo ne multe povis partopreni la aranĝojn. Tial mi nek povas, nek rajtas prijuĝi la aferon. Tial nur kelkaj ĝeneralaj rimarkigoj: kiel 75-jara blindulo mi kompreneble alimaniere perceptas tiajn perretajn kunvenojn. Dum realaj asembleoj oni eĉ senvide iel sentas la regantan etoson. Antaŭ komputilo aŭ saĝfono en propra loĝejo, sen ebleco percepti vidajn informojn de la ekrano, oni almenaŭ dum prezentaĵoj sin sentas kvazaŭ antaŭ radio aŭ televido. Vere nova, interesa situacio ekestas ĉe ebleco de komuna diskuto aŭ simpla babilado en virtuala rondo. Tamen ni esperu, ke venontaj UK-oj denove okazos en reala formo, tre volonte kun la ebleco pri virtuala partopreno.



## Elena Popova (Bulgario)

Bona laboro de la Estraro de UEA pri la VK. Salutojn al ĉiuj!

Tre utila estis por mi la revuo *La Kolombo de Paco*, kiun mi sendis ankaŭ al miaj amikoj. Mi gratulas la Redakcion!

Esperanto estas vera ponto al amikeco. Dank' al ĝi mi havas geamikojn en diversaj landoj.

Mi dirus al la junaj homoj: lernu Esperanton, por ke estu paco kaj amikeco en la mondo!



## SAITO Tume (Japanio)

Mi ĝoje partoprenis en la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto!

Kaj mi povis legi *La Kolombon de Paco*, dank' al ĝi mi detale povis scii la enhavon de la Kongreso!

Kaj mi sciigis pri salutoj en la Malfermo de la Margareta Zaleski-Zamenhof k.a. per nia organo *La Revuo Orienta*.

Mi elore dankas vin ĉiuj organizantoj.



## Lycée Boucher de Perthes (Francio)

Estimataj geamikoj,

Sanon, Feliĉon kaj Aŭdacon al ni ĉiuj!

Mi laŭdas ĉiujn viajn riĉajn agadojn ebligantajn bonan evoluon de nia movado. Gratulojn! Ili pruvas ke nia movado estas sur la bona vojo kun la bona lingvo.

Ni ne forgesu nian ĉefan celon. Kiel en la poemo: «Tiu celo briletas tra densa mallumo!» Do malfacilas ĝin percepti, memori, sekvi, flegi kaj fari ĝin pli intense brila.

La jaro 2021 estas la internacia jaro pri Paco kaj Konfido, kaj la kongresa temo de la 2-a VK trafe kaj bunte prilumis tiun gravan temon por la jaro 2021 kaj por la sekvontaj jaroj.

Kion novan ni esperantistoj faru en la estonteco por sukcese kontribui cele al efektivigado de tiu malfacila sed gravega celo: Paco kaj Konfido en nia mondo.

Por helpi al ni trovi la ĝustan vojon, la antaŭparolo de la konstitucio de Unesko estu nia kerna gvidilo. La tuta teksto de tiu antaŭparolo estas legenda, sed mi nur mencias la unuan frazon: «ĉar la militoj naskiĝas en la homaj mensoj, en la homaj mensoj devas esti konstruataj la defendoj de la paco.»

Evidente la eduksistemoj ĉie en la mondo devas plenumi gravan rolon en tiu afero.


Kaj jen miaopinie nia ĉefa celo: enkonduki Esperanton kaj ties internan ideon en la lernejojn kaj jam en elementajn lernejojn!

Ni iru rekte, kuraĝe kaj neflankiĝante al la ĉefa celo! Temp' esta!



## Aleksej Salomatov(Rusio)

Mi tre ĝojas kaj aprezas la okazigon de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto. Malgraŭ ĉiuj obstakloj Esperanto-movado evoluas kaj progresas. Kaj malfacilaĵoj pro la epidemio eĉ donas kroman puŝon por plibonigi la disvastigon de Esperanto en interreto. Mi deziras pliajn sukcesojn al ni ĉiuj!




## Karel Votoček (Ĉehio)

Esperanto por mi ĉiam signifis klopodon al pli bona mondo, pli facila interkompreniĝo, fakte egalrajteco de ĉiuj homoj.

Virtuala Kongreso estis bona ideo, tamen mi preferas rektan konekton. Pro tio mi senpacience atendas kongreson en Torino, kiu okazos sufiĉe proksime por mi. Renkontiĝoj kun samlandanoj ne estas tiom interesaj, kiom babilado kun samideano el iu malproksima lando. Iutempe mi renkontis samideanon el Orienta Timoro. Miaj amikoj eĉ ne sciis, kie ĉi tiu lando troviĝas!

Esperante, ke la movado vivos ankoraŭ longtempe, kore salutas vin!



## HOŜIDA Acuŝi (Japanio)

Mi sentas, ke la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto 2021 montras, ke nia afero Esperanto vivas kaj progresas spite al nuna pandemio.




## Valentin Melnikov (Rusio)

La 2-a VK, konsiderinte sperton de la 1-a, pasis eĉ pli sukcese.

Miaopinie, indas konservi tiun formaton (paralele kun la ordinara ĉeesta kongreso) ankaŭ por estonto. Ja multaj esperantistoj el plej diversaj landoj ŝatus partopreni tutmondan Esperanto-aranĝon, sed ne povas pro vizaj, monaj aŭ aliaj problemoj.

En ĉiaj kondiĉoj esperantistoj kunvenu kiel eblas. La sperto de 2020–2021 estas nesubtaksebla.



## Milton Paŭlo de Lacerda (Brazilo)

Antaŭ tre longe mi lernis Esperanton, unue pro scivolemo, poste pro konvinko, ke ĝi estas gravega vojo por la unuigo de la popoloj. Efektive la mondo bezonas tian ilon por la nepra neceso de paco kaj konkordo. Al mi Esperanto alvenis kaj daŭre restas valida instrumento por la interkompreniĝo de la homoj. La partopreno en la Virtuala Kongreso estis oportuno reaserti tiun pensmanieron. Mi vere esperas, kvankam seniluzie, ke iom post iom nia kara Lingvo venkos la reziston de la kontraŭuloj. Mia nuna kunlaboro estas la skribado en aŭ tradukado al Esperanto, ĉefe en mia ĉiutaga ĉeesto apud elstara grupo de IKUE, kie ni revas pri la plibonigo de la mondo, ni ŝanĝas ideojn, ni kunpreĝas al la Sinjoro de la vivo, kaj fortigas la kuraĝon por la ĉiutagaj entreprenoj. Dankon pro la oportuno, brakumon!




## Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)

*Voko de VK*

Mi ĝojas ke mi sukcesis partopreni VK-ojn dufoje sinsekve. Dubindas, ke mi trovus monrimedojn por flugi al Montrealo aŭ al Belfasto. Do jen unu avantaĝo de VK. La dua avantaĝo – al mia prelego kaj al la aŭtora horo venis pli da aŭskultantoj ol donus al mi normala UK – la ekskursoj forlogas homojn.

Mankas amikaj brakumoj. Mankas aplaŭda ektondro. Mankas la etoso de espa amaso, kunveninta en unu areo. Ekskursoj mankas – tiujn virtualajn senimpresajn mi ricevas en kelkdeko da TV-kanaloj. Tial mi obstine ŝparas monon kun espero kaj aspire al Montrealo sekvajara. Ĉu mi sukcesos?

Sed eblas ja aranĝi kombinitan UK-on, ĉu ne?



## Dirce Sales (Brazilo)

Saluton al la skipo de VK! Gratulon pro la riĉa programo prezentita. Dankon pro ĉio kaj bondezirojn al la venontaj VK-oj!




## John Magessa (Tanzanio)

Saluton! Mi tre ĝojas kaj dankas pro la 2-a VK!



## Anatoli Lytch (Finnlando)

Dankon pro ĉio organizita kaj interesa!



## Mulele Mbassa Makaranga (Tanzanio)

Koran dankon pro mia partopreno en la 2-a VK! Mi sendas gratulon al la organizintoj! Entute ĝi estis sukcesa!




## Santiago Rodríguez (Kolombio)

Bonan tagon! Mi tre ĝuis la VK-on. Mi estas nova studanto de Esperanto kaj mi tre dankas al UEA pro la amuza evento! Saluton el Kolombio!




## Elda Doerfler (Italio)

Dankon al UEA pro via tre sukcesa laborado! Amikajn gratulojn kaj salutojn!




## Gairik Patranobis (Barato)

Saluton! Mi ekghojis, vidinte, ke mi akiris okazon partopreni en tiu granda evento, la 2-a VK. Koran dankon pro ĉio! Jes, mi denove volonte partoprenos en alia VK.



## MacKenzie Peers (Francio)

Senkondiĉa Amo regu super la Tero kaj la Universo.



## Taylor

Dankon. Mi ŝatus partopreni en ĉeesta kongreso.



## Guadalupe Vega (Meksiko)

Karaj geamikoj: Mi deziras sukceson en la estonteco! ESPERANTO VIVAS KAJ VIVOS, ne gravas la pandemioj. Ni estas kuraĝaj kaj fidelaj esperantistoj. Ĝis la fina venko! Amike.




## Ariadna Briceño (Peruo)

Dankon! Mi estas feliĉa pro la VK!



## Lee Syungnam (Koreio)

Dankon al UEA pro mia partopreno en la 2-a VK. Mi ricevis multan profitajn informojn, precipe pri klimato kaj el la prelegoj de Duncan Charters kaj aliaj.




## Patricio Agustín Iglesias (Argentino)

Hodiaŭ oni ne povas imagi la mondon sen la metra decimala sistemo. Scienco, kulturo kaj industrio prosperis dum la lastaj jarcentoj per internacia mezura konverĝo. Kontraŭe kio okazas kun tradiciaj sistemoj, la decimala estas ege simpla, regula kaj neŭtrala.


Esperanto estas la decima sistemo de la monda komunikado. Kiom da senlaboruloj kiuj bezonas paroli internaciajn lingvojn por atingi postenojn, da junuloj kiuj ne povas studi siajn plej ŝatatajn kursojn, da profesiuloj kiuj ne kapablas koni novaĵojn pri siaj fakoj, povus plibonigi sian situacion per la kreskado de Esperanto, la metra lingvo?

La disvastigo de Esperanto estas granda laboro. Tamen eĉ pli granda estos la fruktoj de tiu klopodo. Antaŭen senĉese, esperantistoj!



## Dimitrije Janičić (Serbio)

Kara "Kolombo", Ĉiu el Viaj 23 surteriĝoj en mia pensiula ĉambro estis ĝojo por mi. Ĝi estis malferma fenestro al tiu fora mondo. Ĝi estis amika saluto de samideanoj. Ĝi estis informo, ke mi havas amikojn en la mondo, kiuj pensas kiel mi. Ĝi estis plezuro, ke legado donas al ni, por kiu la ekrano estas la sola fenestro al la granda mondo. Kiam mi aldonas ke tiuj tekstoj estis perfekte aranĝitaj, teknike rafinitaj, bonguste ilustritaj kaj lingve korektaj, la kontento estis kompleta. Dankon! Mi tre ĝojas, ke mi preskaŭ partoprenis ĉi tiun kongreson.



## Rumjana Budinova (Bulgario)

Mi plezure partoprenis en la 2-a Virtuala Kongreso. Estis facile farita por homoj kiel mi, kiuj ne estas bonaj en novaj teĥnologioj. La Esperantaj Kon-

gresoj havas grandegan signifon por ni geesperantistoj tutmonde. Esperanto por mi estas grandega parto de mia vivo kaj savilo en miaj vivtagaj problemoj. Dankon!




## Fejfi, Magdaléna FEIFIČOVÁ (Slovakio)

Esperanto estas mia kunvojaĝanto tra la vivo jam dum preskaŭ 35 jaroj. Ĝi donis al mi multan ĝojon, multajn travivaĵojn, renkontiĝojn kaj amikecojn, kaj ankaŭ taskojn, kiujn mi sen ĝi ne estus havinta la kaŭzon plenumi. Nun pro mia sanstato (kaj en la lastaj tri jarduonoj ankaŭ pro la pandemia enfermiĝo) mi jam ne tiom ofte povas vojaĝi al la fizikaj renkontiĝoj. Tial mi tre ĝojas, ke ekzistas Eventa Servo, kaj ke ankaŭ la aliaj grandaj eventoj, kiel estas la Somera Esperanto-Studado, la Kongreso de ILEI, la Internacia Fervojista Kongreso kaj la virtuala Universala Kongreso, estas partopreneblaj perkomputile. Ĉi-jara VK estis mia dua Universala Kongreso, kiun mi partoprenis virtuale (pasintjare ĉe mia ĉeĥa amikino, ĉi-jare jam hejme, ĉar mi fine sukcesis aĉeti nelimigitan retaligon per modemo). Ĝi alportis al mia hejmo karajn vizaĝojn de miaj geamikoj, ofte dum multaj jaroj neviditaj, kaj multajn interesajn programerojn, el kiuj mi speciale ŝatas la kant-koncertojn. Egan dankon al ĉiuj, kiuj teknike ebligas tiajn elsendon! Kaj mi jam nun antaŭĝojas pri la sekvontjara, tria VK!



## Emilio Vanderfeesten (Belgio)

La Virtuala Esperanto-Kongreso signifas por mi: amikiĝi denove kun diversaj homoj tra la mondo kaj ĝui la konversaciojn kun ili.



## Luciano Ortelli (Svislando)

La partopreno en la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto estis por mi ege pozitiva kaj grava sperto. Ĉio estis perfekte organizita. Mi ricevis bonegan kaj detalan supervidon de ĉiuj agadoj por- kaj peresperantaj, kiuj okazas en la tuta mondo. Avantaĝo de virtuala kongreso estas tio, ke multe pli da homoj povis esti atingitaj, ol kiom eblas en normalaj ĉeestaj kongresoj, ĉar por ili la kostoj de ĉeesta kongreso en multaj kazoj superas la financajn eblecojn de granda nombro de esperantistoj vivantaj en malpli evoluintaj landoj. Tamen estas tute klare, ke ĉeesta kongreso ebligas la rektan kontakton kun geamikoj, kiujn oni delonge konas, kaj kun famaj reprezentantoj de la Esperanto-movado. Plej bone estus teoria solvo kun ĉiujara ĉeesta kongreso kaj akompane kun antaŭa aŭ posta virtuala aranĝo pri la samaj temoj de la ĉefkongreso mem.




## Luís Ladeira (Portugalio)

Fakte mi registriĝis en la lasta Virtuala Kongreso, sed pro malsanaj kialoj mi apenaŭ partoprenis en ĝi.

Do mi ne havas realan sperton pri ĉi Virtuala Kongreso, kvankam mi taksas ĝin favore eĉ pro tio, ke pli valoras virtuala ol nenio.

Do, amikoj, jen mia opinio.



## Julinjo Farkas kaj Ludoviko Molnár (Hungario)

Estimata Komunumo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto 2021!

Helpe de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto 2021 ni ricevis ravajn travivaĵojn.

En nia tria-floranta aĝo pluse estis granda donaco la serio de *La Kolombo de la Paco* Ili havis eminentajn resumojn kaj tekste kaj bilde.

Ni regule plusendis ilin al la hungariaj diskutlistoj: heamembraro@ kaj tiu de la Esperanto-pedagogoj.

Tutkore ni dankas Vin pro Via enorma fortostreĉo kunordigi kaj organizi tiel elstare, tiel longdaŭre la multkolorajn, riĉajn programojn.

Sanharmonion, entuziasmajn kunlaborantojn deziras, altestime kaj plej amike, D-rino Julinjo Farkas kaj D-ro Ludoviko Molnár.




## Bert de Wit (Nederlando)

Mi tre ŝatis partopreni en programeroj de la Virtuala Kongreso kaj tre aprezas la retinformilon *La Kolombo de Paco*!



## Rubén T. Diaconu (Argentino)

Karaj samideanoj, dankon pro la sukcesa VK. El norda Argentino mi salutas la kongresanojn! Mi kore dankas al UEA kaj speciale al Fernando Maia Jr. pro ilia elstara laboro, kies rezulto estis bunta kaj enhavriĉa VK-programo. Mi vere multe ŝatis kaj profitis la programon.



## Hana Vaskova

Mi volas tre danki al vi ĉiuj, kiuj per via laboro ebligis al ni, partoprenantoj, ĝui malgraŭ la kronviruso etoson de kongreso.

